


La klubo vivo en Antverpeno



Semajnaj raportoj de Ivo Durwael pri la agado de la loka antverpena Esperantoklubo La Verda Stelo

2017

AŬTORO KAJ ELDONISTO

Yves Nevelsteen
Vlaamse Esperantobond
Lange Beeldekensstraat 169
2060 Antwerpen
+32 3 234 34 00
www.esperanto.be

Dato: 2018/03/05

© *Ĉiuj rajtoj rezervitaj de
Yves Nevelsteen kaj Ivo
Durwael*

Enkonduko

Jam de pluraj jaroj mi ĉiusemajne ricevas de Ivo Durwael, la sekretario de la antverpena Esperantoklubo La Verda Stelo, retmesaĝon kiu invitas partopreni al la vendredaj klubvesperoj kaj kiu mallonge resumas kio okazis tie pastinfoje.

Estas tre agrable, praktike kaj instige regule ricevi tiajn mesaĝojn! Preparinte paroligan kurson por progresantoj, mi pripensis ke la mesaĝoj de Ivo estas fakte perfekta enkonduko al la kluba vivo.

Per tiu ĉi verko mi volas elkore danki Ivo-n pro lia multjara sindediĉo! Samtempe mi gratulas kaj dankas ĉiujn kiuj helpis realigi la novan Esperantodomon en Antverpeno. Estis giganta tasko!

Dankon al

- Ella Strug kaj Eddy Van den Bosch
- Nicky Janssen kaj Ivo Vercaemmen
- Klaas Dijkstra
- Pli ol 50 volontuloj, eĉ eksterlandaj kaj ne-esperantistaj, kiu kunlaboris!

Mi varme rekomenci ke vi foje ĉeestu la vendred-vesperajn kunvenojn en la klubejo. Estu bonvena!

10-03-17: Duncan Charters: "Kial prezidento Donald Trump?"

Ni maltrafu la prelegon de iu el niaj plej eminentaj prelegantoj en Esperantio: Duncan Charters. Krome li prelegos pri temo kiu ĉiutage ĉeestas en la komunikiloj: Kial prezidento Donald Trump? Tiel Charters prezentas sian temon: "De la perspektivo de brito loĝanta duonjarcenton en Usono, okazis profundaj sociaj ŝanĝoj en la lando. En la kuniĝo de reagoj al tiuj ŝanĝoj povas troviĝi ŝlosiloj por klarigi la neaŭtaŭvideblan kaj surprizan elekton de netradicia gvidanto por la venontaj kvar jaroj."

Kiel kutime la kunveno komenciĝas je la 20-a horo. Sed je la 18:30 vi povos jam vespermanĝi en la klubejo kune kun la preleganto, sed vi anoncu vian partoprenon al financoj@fel.esperanto.be aŭ 03 234 34 00 ĝis ĵaŭdo, 09-03 tagmeze.

Leĝo devigas nian kasiston por baldaŭ ensendi la financon kaj moralan jarraportojn, aprobitaj de la ĝenerala kunsido. Tio okazos do mallonge antaŭ la prelego. La honorigo de fidelaj membroj okazos iam poste.

Nia klubejo ne jam tute pretas. Jam 51 volontuloj ofertis tempon kaj energion, sed pliaj helpaj manoj ankoraŭ bonvenas kaj necesas (nur anticipi interkonsentu kun Nicky aŭ Gerd). Malgraŭ tio ni tamen planas regulajn vendredajn kunvenojn. Pliajn detalojn vi povos trovi en la renovigitaj retpaĝoj: <http://esperanto-antwerpen.weebly.com>.

17-03-2017: Et-rakontoj de Jakvo + interkonsiliĝo pri la aspekto de la kunvensalono

Venontan vendredon, la 17-an de marto je la 20-a horo Jakvo denove voĉlegos kelkajn el lia granda serio da et-rakontoj. Kutimaj membroj jam multfoje spertis ke Jakvo – naturdotita – scipovas rakonti spritajn, sed ankaŭ pensigajn rakontojn pri okazintaĵoj el la ĉiutaga vivo. Pro la uzo de multaj detaloj, li montriĝas akra observanto kaj tiel reliefigas siajn originalajn ideojn kaj vidpunktojn pri nia socio. Vi certe ĝuos!

Ella intencas prezenti diversajn sugestojn pri la enordigo de la kunvensalono. Ŝi alvokas por kiel eble plej multnombro ĉeesti por interkonsiliĝi. Aldone ŝi ankaŭ alvokas por volontuli ĉar – kvankam ni jam povas kunveni – ankoraŭ multo farendas.

Pasintan vendredon, nia unua kunveno feste komenciĝis. Nicky riĉe kaj abunde dorlotis 15 ĉeestantojn per la komuna manĝo. Poste sekvis la jarkunveno kaj la ĉeestantoj senhezite aprobis la financ- kaj aktivec-raportojn pri 2016.

Duncan Charters, specialisto i.a. pri instruado, donis al ni unikan ekzemplon kiel eblas prilumi aktualan temon kun multaj nuancoj kaj konkretaj donitaĵoj kaj daŭre kateni la atenton de la publiko. Li montris, surbaze de longa serio da faktoroj pri la tendencoj en la usona socio, ke la venko de Trump ne estis surpriza. Li pentris, almenaŭ por mi, novan bildon pri la nuna prezidento kaj prilumis liajn fortojn sed ankaŭ liajn malfortojn, kiuj povus konduki al lia antaŭtempa demisio. En la dua parto, la ĉeestantoj faris multajn demandojn, tiel ke ni longe transiris la kutiman fermohoron de la kunvenoj. Krom la novaj vidpunktoj pri Usono postrestis granda admiro por la eminenta preleganto. Do, kiel vi povas legi, vizito al la klubkunveno ĝis restas evento!

24-03-2017 - Eddy Van den Bosch: Bildoj pri la jaro 2016 en LVS

Ni reprenis la ritmon de ĉiusemajnaj kunvenoj, kiujn mi anoncas per novaĵletero. Kiam vi ne ricevis ĝin vi anoncu tion al ivo.durwael@telenet.be. Sed vi ankaŭ povas trovi aktualajn informojn pri via klubo kaj ĝiaj vendredaj vesperoj ĉe <http://esperanto-antwerpen.weebly.com/>.

Venontan vendredon, la 24-an de marto je la 20-a horo, Eddy Van den Bosch prezentos la plej trafajn bildojn pri La Verda Stelo-aktivecojn en 2016. Kune kun reagoj de la ĉeestantoj, tio sendube denove iĝos etosplena vespero, plena je vivaj rememoroj.

Pasintan vendredon ni ĝojis pro la revido de Jakvo. Li voĉlegis kelkajn el lia granda kolekto da vivaj etrakontoj, kies finaj frazoj ĉiufoje surprizas kaj pensigas nin. Feliĉe Jakvo pretas refari similan programon kaj povos daŭrigi ankoraŭ multfoje.

Post la paŭzo, Ella prezentis per skizaj mapetoj sed ankaŭ per indiko de la konkretaj lokoj, kelkajn eblecojn kiel La Verda Stelo povus aranĝi la kunvensalonon. Sed evidente tio okazu interkonsiliĝe kun FEL, la posedanto de la domo. Intertempe LVS povas kunveni kaj ankaŭ aliaj organizaĵoj povas uzi la salonon.

31-03-2017 - Leontine Janssens: farado de bondezirkartoj

Venontan vendredon, la 31-an de marto je la 20-a horo, Leontine denove organizas sian kreivan vesperon. La grandaj skatoloj, plenaj de materialo por mem produkti bondezirkartojn jam troviĝas en la kunvenejo. Do ne necesas mem zorgi pri tio. Vi nur kunportu vian kreivecon. Kaj eĉ tiuj kiuj ne emas partopreni povas ariĝi en angulo por agrabla babilo pri vetero kaj cetero!

Pasintan vendredon Eddy Van den Bosch montris la plej trafajn bildojn pri la vivo en La Verda Stelo, sed ankaŭ pri la Beneluksa Kongreso en Lier. Malpli granda publiko ĉeestis pro koincido kun la PEKO-renkontiĝo. Sed estis tre agrable por revidi bildojn pri prelegoj kaj renkontiĝoj, kiuj jam iom svagiĝis en nia memoro. Elkoran dankon pro la zorga elekto, Eddy.

07-04-2017: Mallongaj filmoj en Esperanto

Venontan vendredon, la 7-an de aprilo je la 20-a horo, mi projekcios kelkajn mallongajn filmojn (3 ĝis 12 minutajn). Okaze de Festivalo en aprilo, la Ĉina Radio Internacia organizis filmkonkurson de mallongaj filmoj pri teo kaj amo. Mi spektis la kolekton da filmetoj, ĉu en Esperanto, ĉu kun subtitoloj en Esperanto. Mi montros kelkajn el la plej allogaj.

La 14-an de aprilo, Frans Meul rakontos pri surpriza vojaĝo: oni enskribiĝas por vojaĝo al 3 diversaj urboj, sed oni antaŭe ne konas la vojaĝcelojn. Evidente, kiel kutime, tiu prezentado estos kun multaj trafaj bildoj.

Pasintan vendredon, Jo Haazen kune kun Nicky Janssen kaj Ivo Vercammen jam rendezuis dumtage en la Esperanto-domo kaj prizorgis agrablan surprizon por la vesperaj vizitantoj. Per reordigo de mebloj kaj purigo, subite la – ĝis nun iom malorda – kunvensalono akiris multe pli allogan aspekton. Tio evidente estas plia paŝo al definitiva aranĝo. Kaj Willy Smet preskaŭ finis la kaheladon de la dua necesejo kaj de la duŝejo. Deknaŭ personoj ariĝis en amika kaj dinamika etoso, ĉu por mem krei

bondezirkartojn sub la gvido kaj kun materialo disponigita de Leontine Janssens, ĉu por agrable kaj vigle babili pri diversaj eblecoj de la Esperanto-domo sed ankaŭ de la Esperanto-vivo en la mondo. Ni havis renoman gaston, la ruson Vladimir Samodaj. Li promesis reveni kaj prelegi en nia klubo en junio.

Do certe (re)venu por admiri la aspekton de nia Esperanto-domo.

14-04-2017 - programŝanĝigo!

Ĉar pluraj klubanoj ĉeestos en PEKO, ni prokrastas la antaŭviditan programon de Frans Meul (Surprizaj Urbovizitetoj) al vendredo, la 21-a de aprilo.

Venontan vendredon, la 14-an de aprilo je la 20-a horo mi denove montros tre belan artan filmon kun esperantlingvaj subtitoloj. Temas pri juna knabino, kiu esploras la pasintecon de ŝiaj gepatroj, kiujn ŝi ne konis. Kiam Klaas montris ĝin pasintjare la reagoj estis tiel pozitivaj ke indas remontri ĝin.

Pasintan vendredon, ni ankaŭ spektis filmojn: serion da mallongaj esperantlingvaj filmoj (2 ĝis 10 minutaj) kun tre varia enhavo kaj aspekto. Temas pri selekto de filmetoj pri "Teo kaj Amo" por la konkurso de Ĉina Radio Internacia.

21-04-2017: Frans Meul: surprizaj vojaĝoj - 28-04-2017: Vivo en Esperantio

Venontan vendredon, la 21an de aprilo Frans Meul raportas pri siaj spertoj dum surpriza vojaĝo: oni kondukas la partoprenantojn al 3 urboj por rapida vizito, sed ili ne antaŭscias la celojn.

Frans tre spertas pri fotado kaj do ni certe ĝuos interesan prelegon kun aro da trafaj bildoj.

Por la programo de vendredo, la 28-a de aprilo mi apelacias al ĉiuj klubaj aktivuloj por kune prezenti ion pri la internacia Esperanto-vivo: raportoj, anekdotoj kaj fotoj pri i.a. PEKO, PSI ktp., planoj pri partopreno kaj informoj pri la UK en Seulo, pri SES, pri staĝoj en Grésillon kaj pri ĉiuj aliaj iniciatoj, kiujn klubanoj intencas partopreni. Do se vi havas fotojn, informojn, ideojn kaj planojn raportindajn, bv. informi min kune kun la tempo kiun vi povas plenigi kaj tiam mi kunmetos iun sinsekvon.

Pasintan vendredon, ho ve, katastrofo! Mi intencis do montri filmon. Klaas detale klarigis al mi kiel mi faru kaj akompanis min ĝis mi havis filmon kun Esperantlingvaj subtitoloj. Por esti certa, mi fermis la programon kaj denove alklakis la ikonon kaj tuj revidis la filmon kun subtitoloj. Memfide mi iris vendredon al la kunvenejo ... sed kiam mi alklakis la ikonon, la filmo ne aperis!!! Mi rekomencis, reprovigis kaj reprovigis, sed mi fine nur sukcesis funkciigi la filmon sen subtitoloj. Kia embaraso!

Sed feliĉe ni estis nur kvarope ... kaj ĉiuj kvar ni agrable babilis pri vetero kaj cetero en Esperanto. Kaj je la 21h30 surprize alvenis Pieter Vets kun familio kaj kun Pieter ni plubabilis en Esperanto. Uf! La kunveno ne tute vanis.

Venontan vendredon, vi ne timu kolapson de la programo, ĉar ĉi-foje spertulo prizorgos la vesperon!

Ankaŭ regule vizitu nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen por aktualaj informoj kaj amikiĝu kun ni en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>

28-04-2017: vivo en Esperantio - 05-05-2017: Jakvo voĉlegos kelkajn etrakontojn

Venontan vendredon, la 28-an de aprilo, je la 20-a horo, ni prezentos al vi kelkajn eblecojn por sperti en "Esperantio": Klaas rakontos pri ĵus pasinta PSI kaj montros bildojn, Raf rakontos pri SES, Eddy mallonge informos pri eblecoj en interreto por orientiĝi pri renkontiĝoj, mi ankoraŭ kontaktis membrojn por diri ion pri OSIEK, pri la UK en Seulo ktp.

Do certe venu, ĉu por informiĝi, ĉu por transdoni informojn kaj spertojn

Vendredon, la 5-an de majo, Jakvo denove voĉlegos kelkajn etrakontojn el sia 164-era kolekto!

Pasintan vendredon, ni kunĝuis kun Frans Meul kaj edzino Luce la allogon de surpriza vojaĝo al 3 eŭropaj grandurboj en 10 tagoj sen anticipe koni la celojn kaj do sen havi eblecon por prepari sin. Kiel kutime Frans montris belegan fotoaranĝon pri la urboj sed ankaŭ partoprenigis nin en la surpriza efiko de tia ekskurso.

Subitaj ŝanĝoj en nia programo ĉiam eblas. Tial vizitu regule nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen por aktualaj informoj kaj amikiĝu kun ni en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>.

05-05-2017: Etrakontoj de Jakvo - 12-05-2017: Jarraportoj kaj honorigo de jubileantoj kaj aktivuloj

Venontan vendredon, la 5-an de majo je la 20-a horo, ni ĝuu kelkajn etrakontojn de Jakvo. Jakvo mem ne ĉeestos pro malbonfarto. Sed li disponigis kelkajn ĉarmajn, amuzajn kaj samtempe pensigajn etrakontojn kiujn iuj voĉlegos.

Pro neceso la jarkunsido okazis en kvaronhoro la 10an de marto. Sed la 12an de majo, Frans Meul kaj mi pli detale prilumos la financojn kaj la aktivecojn de la pasinta jaro kaj Eddy Van den Bosch montros bildojn pri la kunvenoj. Post tio ni honorigos fidelajn membrojn kaj aktivulojn. Je la 18h30 ni ofertas al la jubileantoj senpagan manĝon sed ankaŭ vi povas partopreni la manĝon kaj pasigi agrablan horon antaŭ la kunveno sed vi anoncu vian partoprenon ĝis ĵaŭdo, la 12a de majo tagmeze (financoj@fel.esperanto.be aŭ 03 234 34 00).

Pasintan vendredon, ni ricevis superrigardon pri kelkaj popularaj renkontiĝoj en Esperantio. Nicky detale raportis pri la junetosa PEKO en Amougies. Klaas montris bildojn pri la familia renkontiĝo PSI en Essen. Raf rakontis pri siaj spertoj en SES kaj pri la ĉi-jara studsemajno en Nitra. Chris klarigis al ni la celon kaj la programon de IEK, kiu okazos samtempe kaj en la sama ejo kiel SES. Eddy mallonge prilumis la retajn eblecojn por informiĝi pri Esperantio, i.a. per QR-kodoj, sed li promesas iam poste pri detale informi nin per tutvespera programo. Fine Nicky skizis la turbulan historion de la esperanto-kastelo Grésillon kaj ĝiaj nuntempaj programoj kaj eblecoj.

Entute tre agrabla superrigardo pri eblecoj por esperantumi en ne tre fora distanco.

Vizitu regule nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen por aktualaj informoj kaj amikiĝu kun ni en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>

12-05-2017: Jarraportoj kaj honorigo de fidelaj kaj plej aktivaj membroj
19-05-2017: Mikaelo Bronŝtejn: Akceptu mondon mi amike aŭ sperto vojaĝi en Esperantujo

Venontan vendredon, la 12-an de majo je la 20-a horo Frans Meul kaj mi pli detale prilumos la financojn kaj la aktivecojn de la pasinta jaro kaj Eddy Van den Bosch montros bildojn pri la kunvenoj. Post tio ni honorigos fidelajn membrojn kaj aktivulojn. Je la 18h30 ni ofertas al la jubileantoj kaj aktivuloj senpagan manĝon sed ankaŭ vi povas partopreni la manĝon kaj pasigi agrablan horon antaŭ la kunveno, sed vi anoncu vian partoprenon ĝis ĵaŭdo, la 12-a de majo tagmeze (financoj@fel.esperanto.be aŭ 03 234 34 00).

Certe notu en vian agendon la programon de la 19-a de marto: Mikaelo Bronŝtejn (RU), kiun multaj membroj persone konas kaj kiu plurfoje ĉarmis per prelego en nia klubo, revenos. Li rakontos pri vojaĝaj spertoj al esperantistoj en kelkdekoj da landoj!

Pasintan vendredon, pro malbonfarto de Jakvo, mi voĉlegis kelkajn liajn etrakontojn. En la tempo inter tiuj foje amuzaj, foje emociigaj rakontoj, ni ankaŭ interŝanĝis personajn spertojn. Bela ebleco por aŭskulti tekstojn kaj mem praktiki esperanto-konversacion. Vizitu regule nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen por aktualaj informoj kaj amikiĝu kun ni en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>

19-05-214: Mikaelo Bronstejn (RU) "Akceptu mondo min amike, aŭ sperto vojaĝi en Esperantujo" - 26-05-2017: Eddy Van den Bosch "Riskokvizo"

Venontan vendredon, la 19-an de majo, ni akceptos denove Mikaelo Bronstejn, kiu jam diversfoje vizitis nian klubon kaj ravis nin per siaj allogaj prelegoj kaj kantado kun gitara akompano. Ĉi-foje lia prelego titolas: Akceptu mondo min amike! Li aldonis jenan enkondukon: "La iama Sovetunio formis el inter siaj civitanoj la kaston, nomatan "Nevijezdnyje", t.e. personoj, kiujn la ŝtato senigis je rajto eliri trans la limojn de la lando. La preleganto havis malbonŝancon aparteni al tiu kasto do, nur rezulte de certaj politikaj ŝanĝoj, ekde 1990 li sukcesis ekvojaĝi eksterlanden. Dum la pasintaj dudek jaroj estis vizititaj kelkdek landoj en kaj ekster Eŭropo, sed speciala karakteriza trajto de ĉiuj vojaĝoj estas ke ili okazis en Esperantujo – per invitoj de esperantistaj kolektivoj kaj ĝenerale por propagandi la internacian lingvon. Nun ankaŭ vi povas ekscii pri la unikaj spertoj vojaĝi en la monda Esperantujo. Per amuzaj historietoj, poemoj kaj kantoj ĉion ĉi prezentos mem la spertinto, Mikaelo Bronŝtejn."

Vi povos jam konatiĝi kun la preleganto dum la manĝo je la 18h30 sed nepre anoncu vin se vi volas partopreni ĝin ĝis ĵaŭdo tagmeze al financoj@fel.esperanto.be aŭ 03 234 34 00.

La postan vendredon, do la 26-an de majo, Eddy Van den Bosch denove prezentos sian popularan riskokvizon.

Pasintan vendredon, la salono pleniĝis per festaj bruoj ĉar 18 membroj partoprenis komunan manĝon. Mi raportis pri la klubaj aktivecoj en 2016. Post venko de komputilproblemo, Frans Meul detale prezentis la financajn rezultojn kiuj finiĝis per deficino. Feliĉe la klubo havas konsiderindan rezervon. Poste mi rakontis kelkajn sciigojn pri honorigataj membroj pro fidela membreco. Eddy van den Bosch montris la plej trafajn bildojn pri la klubaj aktivecoj. Fine, Ella Strug prilumis la meritojn de tiuj membroj kiuj aktive kaj ripete agadis por la klubo.

Edukado.net informis ke tiuj, kiuj volas partopreni KER-ekzamenon enskribiĝu antaŭ la fino de majo: <http://edukado.net/novajhjoj?id=698>.

La esperantista kastelo Grésillon prezentas ĉiujare tre varian programon dum la feriaj monatoj: <http://gresillon.org/spip.php?rubrique30&lang=eo>.

Vizitu regule nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen por aktualaj informoj kaj amikiĝu kun ni en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>

26-05-2017: Eddy Van den Bosch - Risko-kvizo - 02-06-2017: Pjotr De Mulder: gitarkonzerto; Kiki Tytgat: Kiuj estas la flandraj majstroj en pentroarto?

Venontan vendredon, la 26-an de majo je la 20-a horo, Eddy Van den Bosch denove prezentos sian Risko-kvizon: la ĉeestantoj dividiĝas en grupetoj kaj mem elektas kiom da poentoj ili riskas por ĉiu demando. Tre populara, amuza kaj instrua programo.

La 2an de junio, la programo komenciĝas per duonhora konzerto de Pjotr De Mulder sur klasika gitaro. Tuj poste Kiki Tytgat daŭrigos per prelego kun bildoj pri la "flandraj Majstroj en Pentroarto". Ambaŭ kontribuontoj garantias altnivelan kulturalan programon.

Pasintan vendredon, Mikaelo Bronstejn allogis 22 ĉeestantojn kaj amuzis nin per spritaj rakontoj pri la (mal)eblecoj por vojaĝi eksterlanden dum la soveta epoko kaj per konzerto de memverkitaj aŭ memtradukitaj kantoj.

Mi baldaŭ ferios eksterlande kaj tiam ne sendos novaĵleteron. Tial vizitu regule nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen por aktualaj informoj kaj amikiĝu kun ni en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>

09-06-2017: Ptasinsky (DE) malhelpata. Anstataŭa programo: intensa konversacio. 16-06-2017: Ella Strug pri Kader Abdollah

Martin Ptasinsky jam preparis prelegon pri "Slavaj Interlingvoj" kaj aĉetis bileton por trajni al Antwerpen. Sed intervenis neatendita familia devo kaj tial li prokrastas sian viziton. Anstataŭe ni organizos jenan programon por vendredo, la 9-a de junio ekde la 20-a horo: Intensan Konversacion. Ni dividos la ĉeestantojn en grupetojn. En ĉiu grupeto estu unu spertulo, kiu akompanos malpli spertajn membrojn.

La rolo de la spertulo ne estas multe rakonti, sed kontraŭe instigi la aliajn al konversacio per la daŭra starigo de demandoj, sinsekve al ĉiu en la grupeto. La spertulo ankaŭ NE sisteme korektu gramatikajn erarojn: la celo estas insitigo al sentima esprimo de siaj ideoj en Esperanto. La grupgvidanto ankaŭ malpermesu "Ik zal 't eens effen in 't Nederlands zeggen"! La senkrokodila konversacio okazu de la 20-a ĝis la paŭzo. Poste la grupgvidanto elektas alian grupeton ĝis la 22a. Ni esperas revidi multajn al kiuj mankas konversacieblecoj, sed ankaŭ plurajn spertulojn kiuj volas dediĉi sian vesperon al gvidado de grupo.

La 16an de junio vi povos ĝui prelegon de Ella Strug pri Kader Abdollah. Abdollah estas irandevna aŭtoro, kiu jam longe vivas en Nederlando kaj mirige pentras en siaj romanoj la emociajn konfliktojn pro konfrontiĝo de ege variaj kulturoj.

16-06-2017: Ella Strug pri Kader Abdollah

23-06-2017: Vladimir Samodaj (RU): "Arabaj landoj, impresoj de tradukisto"

Venontan vendredon, la 16-an de junio je la 20-a horo, Ella rakontos pri Kader Abdollah, la iran-devena nederlanda aŭtoro de multaj trafaj premiitaj romanoj, kiun ŝi persone renkontis.

La postan vendredon, la 23-an, Vladimir Samodaj intencas rakonti pri siaj impresoj en Algerio, Jemeno, Sirio, Irako, Jordanio, kie li laboris kiel arablingva tradukisto aŭ simple turistis (nur en Jordanio).

Pasintan vendredon, nur 6 personoj partoprenis la konversacian vesperon, kiu anstataŭis la prelegon de Martin Ptasinsky. Ni tamen havis viglan senkrokodilan etosplenan konversacion.

Sabaton, la 1-an de julio, "Paco kaj Justeco" en Bruĝo organizos "enigman promenadon" ("trovu la viktimon"), ege surprizan serĉpromenadon, kiu jam entuziasmigis multajn antaŭajn partoprenintojn. Detalojn vi trovos ĉe <http://esperanto.be/brugge/>. Nicky proponas grupan alvojaĝon el Antwerpen per sia buseto. Sed Bruĝo petas aliĝon antaŭ la 20-a de junio. Do interesitoj ankaŭ anoncu sin baldaŭ ĉe nicky24@telenet.be.

Por havi plej aktualajn informojn pri nia klubo: vizitu regule nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen kaj amikiĝu kun ni en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>

23-06-2017 - Vladimir Samodaj: Arabaj landoj. Impresoj de tradukisto

30-06-2017 - Chris Declerck: Kvin kverkoj kaj la sekvo

Venontan vendredon, la 23-an de junio je la 20-a horo ni aŭdos pri la spertoj de Vladimir Samodaj, kiu naskiĝis en Ukrainio kaj pasis sian vivon en Rusio kiel arabisto sed nun loĝas en Belgio. Li intencas rakonti pri siaj impresoj en Algerio, Jemeno, Sirio, Irako, Jordanio, kie li laboris kiel arablingva tradukisto aŭ simple turistis (nur en Jordanio).

Je la 18h30 vi povos manĝi kun nia preleganto, sed vi anoncu vin ĝis ĵaŭdo tagmeze: financoj@fel.esperanto.be aŭ 03 234 34 00. Jola estas nova kuiristino. Iwona jam spertis ŝian kapbablون kaj garantias bonkvalitan bongustan manĝon. Do mi petas laŭeble enskribiĝi por la manĝo por kuraĝigi la novulinon, esperante ke ŝi revenos. Cetere se alia membro povas/pretas foje kuiri por klubanoj, certe ne hezitu por anonci vin.

La 30an de junio Chris Declerck enkonduke rakontos pri sia aperonta "lasta" romano: "Kvin kverkoj kaj la sekvo".

Pasintan vendredon, Ella Strug pentris por ni tre plaĉan personan bildon pri la nederlanda, irandevena furora aŭtoro Kader Abdollah. Dum libroborso, Ella havis eblecon pri persona konversacio. En siaj romanoj li belege pentras la praktikajn sed precipe la emociajn problemojn pro konfrontiĝo de tradicioj kaj novaj tendencoj kiam plej diversaj kulturoj renkontiĝas.

Vizitu regule nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen por aktualaj informoj kaj amikiĝu kun ni en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>

23-06-2017 - uzu manĝeblecon!

Ĉi vendredon ni havas novan kandidat-kuiristinton sed ŝi emis rezigni pro malmultaj sinanoncoj. Eble vi forgesis mendi! Rapide ankoraŭ anoncu vin hodiaŭ por kuraĝigi ŝin, telefone al 03 234 24 00! Urĝas!

30-06-2017 - Chris Declerck: Kvin Kverkoj kaj la Sekvo

Venontan vendredon, la 30-an de junio je la 20-a horo Chris Declerck per prelego enkondukos sian novan aperontan (kaj lastan) romanon: "Kvin Kverkoj kaj la Sekvo". En nia klubo, Chris estas nia aŭtoritatulo pri literaturo. Li prijuĝis manuskriptojn, reviziis kaj tradukis, verkis artikolojn en diversaj revuoj kaj mem verkis tri librojn. Nun li prezentos sian kvaran. Malgraŭ sia granda kono Chris uzas en siaj prelegoj lingvaĵon kiun ĉiu povas kompreni kaj ĝui.

Dum la feriaj monatoj, ni laŭeble mobilizas eksterlandajn esperantistojn en nia lando pri kiuj mi ekhavas informojn. Tial mi cirkulere anoncas la programon nur kelkajn tagojn antaŭ la kunventago. Lastminutajn informojn vi ankaŭ povos trovi en nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen aŭ en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>

Mi alvokas por informi min kiam vi atendas gaston. Sed ankaŭ repreni iaman interesan prelegon estas ĝuinda propono por nia somera programo. Bv. kontaktu min kiam vi pretas tiel kontribui al iu vendredo.

Pasintan vendredon Vladimir Samodaj prezentis surprizajn rakontojn pri sia vivo kiel tradukisto kaj interpretisto en Alĝerio kaj precipe en Mez-Orientaj landoj. Ĉar li ofte restadis por longa periodo, li havis pli vivajn bildojn pri la vivo en tiuj landoj ol turisto. Krome li laboris en periodo kiam turismo maloftis tie. La bildoj pri vidindaĵoj estis plej ofte nur la instigo por rakonti spertitajn travivaĵojn.

07-07-2017 - Lode Van de Velde: Verkado de Hajkoj

14-07-2017 - Vilhelmo Lutermano: Le Monde Diplomatique kaj MAS

Venontan vendredon, la 7an de julio je la 20-a horo Lode Van de Velde organizos vesperon pri la verkado de Hajkoj, japana poezio-formo. Unue li prezentos mallongan enkondukon pri Hajkoj kaj poste li helpos la ĉeestantojn mem verki pere de kelkaj teknikoj. Lode jam iam organizis similan vesperon kaj tio montriĝis tre aktiva, amuza, inspiriga vespero.

Vendredon la 14an de julio ni akceptos eksterlandan vizitanton: Vilhelmo Lutermano. Lia prelego titolas: "Rezultoj de la konferenco de la internaciaj eldonoj de Le Monde diplomatique kaj la situacio de MAS". Kelkaj interesaj sciigoj pri nia gasto: antaŭ fariĝi konvinkita Esperantisto li forte kontraŭstaris nian lingvon. Li estas nun unu el la plej aktivaj defendantoj de Eo. Liaj aktivecoj: fondinto de MAS (Monda Asembleo Socia), redaktoro de la esperanta eldono de "Le monde diplomatique en esperanto", la eldonisto de pli ol 170 Eo-libroj.

Pasintan mardon, vi ricevis helpalvokon por malplenigi la garaĝon de Chris Declerck, poste malplenigi luitan stokejon kaj transporti kelkmilojn da libroj al la garaĝo de Chris kaj libroŝrankojn kaj materialojn al la sidejo de FEL. Komence estis iom da dubo ĉu tio realigeblas en nur 3 tagoj, sed 9 membroj sukcesis realigi ĉio tion en 2 tagoj! Elkoran

dankon Chris, Ivo Vercammen, Nicky, Klaas, Mireille, René, Andreo, Ben!
Pasintan vendredon Chris Declerck – malgraŭ streĉaj tagoj pro supre menciita translokigo – detale prezentis al ni siajn spertojn kaj impresojn kiuj kondukis lin al sia tria romano. Li ankaŭ voĉlegis fragmentojn el tiu libro kaj tio estis “antaŭpremiero” ĉar la nova verko ne jam estas presita. La intenco estas publikigi kaj prezenti ĝin en la momento de la inaŭguro de la nova oficejo en Lange Beeldekensstraat.

14-07-2017 - Vilhelmo Lutermano (DE): Rezultoj de la konferenco de la internaciaj eldonoj de Le Monde diplomatique kaj la situacio de MAS 21-07 KLUBO FERMITA!!

Venontan vendredon, la 14an de julio je la 20-a horo ni havos eksterlandan gaston, Vilhelmo Lutermano. Lia prelego titolas: “Rezultoj de la konferenco de la internaciaj eldonoj de Le Monde diplomatique kaj la situacio de MAS”. Kelkaj interesaj sciigoj pri nia gasto: antaŭ fariĝi konvinkita Esperantisto li forte kontraŭstaris nian lingvon. Li estas nun unu el la plej aktivaj defendantoj de Eo. Liaj aktivecoj: fondinto de MAS (Monda Asembleo Socia), redaktoro de la Esperanta eldono de “Le monde diplomatique en Esperanto”, la eldonisto de pli ol 170 Eo-libroj. Vilhelmo estas vigla instiga preleganto kaj certe katenos vian atenton dum la tuta vespero.

Notu ke NE ESTOS KUNVENO VENDREDON LA 21-AN.

La 28-an Pjotr De Mulder kaj Valère Dumont prizorgos junulan kaj instigan programon. Pjotr rakontos pri siaj aventuroj en 2016, i.a. kun la Verdaj Skoltoj kaj Valère sendube donos raportojn kaj klarigojn pri diversaj iniciatoj liaj por plivigligi la Esperanto-movadon.

Pasintan vendredon, Lode skizis la historion de la Hajko-tradicio, klarigis la esencajn sed ne neprajn regulojn de hajkoj, montris ekzemplojn de famaj hajko-majstroj kun tradukoj en diversaj lingvoj. Post la paŭzo la ĉeestantoj mem ekaktivis kaj produktis kelkdekojn da hajkoj, kiujn ni kune komparis. La sukceso de la vespero evidentiĝis pro tiu aktiva partoprenado en la dua parto.
Reprogramenda!

Vizitu regule nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen por aktualaj informoj kaj amikiĝu kun ni en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>

21-07-2017: KLUBEJO FERMITA - 28-07: Klaas Dijkstra: “Klaas Dijkstra”

La 21an de julio ne okazos kunveno.

Vendredon, la 28an de julio je la 20-a horo, Klaas Dijkstra prelegos ne pri si mem sed pri sia samnumulo. La enhavo restos mistero ĝis la 28a!

Pasintan vendredon, Vilhelmo Lutermano rakontis pri diversaj temoj, i.a. pri “Le Monde Diplomatique” en Esperanto” (<http://eo.monedediplo.com>), pri MAS (Monda Asembleo Socia) kaj pri ĝiaj 186 eldonitaj libroj, pri Unesko-Kuriero en Esperanto kaj fine ankaŭ kiel li transformiĝis de skeptika kontraŭulo de Esperanto al iu el la plej aktivaj Esperantistoj. Per sia trankvila, neformala rakonta stilo Vilhelmo - dum 2 horoj - kaptis nian atenton kaj samtempe transdonis utilajn informojn kaj spertojn.

28-07-2017 - Klaas Dijkstra: Klaas Dijkstra
4-08-2017 - Pjotr De Mulder: Miaj spertoj ĉe la Verdaj Skoltoj

Ĉi vendredon Klaas Dijkstra prelegos pri sia samnomulo Klaas Dijkstra. Vendredon, la 4an de aŭgusto Pjotr De Mulder rakontos pri siaj spertoj ĉe la Verdaj Skoltoj.

04-08-2017 - Pjotr De Mulder: Miaj spertoj ĉe la Verdaj Skoltoj
11-08-2017 - Raportoj pri Int. E-o Renkontiĝoj

Vendredon, la 4-an de aŭgusto, je la 20-a horo, Pjotr De Mulder rakontos kaj montros bildojn pri siaj aventuroj ĉe la Verdaj Skoltoj (skolta movado por Esperanto-parolantoj).

Vendredon, la 11-an de aŭgusto ni invitas vin por raporti pri ĵus pasintaj Esperanto-renkontiĝoj. Se vi havas ion rakontindan, bv. antaŭe averti min. Tiel mi povos anticipi dividi la disponeblan tempon kaj la sinsekvon. Ella kaj Eddy jam promesis raporti pri Lesjöfors/Svedio kaj Raf montros siajn bildojn pri Kulturaj Esperanto-Kursoj en Slovakio. Espereble Chris pretas informi pri la Osiek-konferenco en la sama loko.

Pasintan vendredon, Klaas Dijkstra prelegis pri Klaas Dijkstra. Tiu Dijkstra estis pitoreska figuro, kiu opiniis sin pli saĝa ol ĉiuj fizikistoj kaj astronomoj kaj plenigis librojn por pruvi ke la tera ne estas globa sed plata, ne havas trajektorion en la spaco sed nur baskulas, ke la sunradioj brilas nur unudirekten ktp. Kaj plej surprize, li trovis aron da adeptoj. Kaj eĉ post lia morto en 1969 ankoraŭ ekzistas movado por defendi liajn ideojn. Surpriza vespero!

An Olijslagers invitas nin al kunveno en septembro:

"La organizantoj de TRE-PEKE invitas vin al nia jara internacia renkontiĝo. La evento okazas sabate, la 16-an de septembro cirkaŭ Veldhoven (apud Eindhoven). Ni promesas ke estos malstreĉa tago. Ni eĉ faros ekskurson al Belgio, do ne forgesu vian pasporton. (por la Nederlandanoj). La precizan tagprogramon ni sendos post via alliĝo. Se vi volas partopreni bonvolu registri vin antaŭ la 8-a de septembro per ĉi tiu retadreso: tre-peke@lafontano.net. Kaj bonvolu ankaŭ menciigi ĉu vi volas vespermanĝi kun ni (aŭ ne)."

11-08-17 - Someraj renkontiĝoj - 18-08-17 - André Staes: Paradoksaj Rememoroj je okazonta vojaĝo al Kopenhago

Venontan vendredon, la 11an de aŭgusto, je la 20-a horo, ni povos kunĝui rememorojn pri ĵus okazintaj renkontiĝoj: Ella kaj Eddy raportos pri Kultura Esperanto-Kurso en Lesjöfors (Svedio), Raf montros siajn bildojn pri Somera Esperanto-Studado en Banská Štiavnica (Slovakio) kaj Chris rakontos siajn impresojn pri la Osiek Konferenco en la sama loko. Ĉu vi ĉeestis alian eventon? Ni volonte aŭskultos vin. Restas ankoraŭ tempo por aldoni plian raporton, sed prefere avertu min anticipi.

La 18an, ĵus antaŭ sia vojaĝo al Kopenhago, André Staes aŭdigos siajn ĉi rilatajn Paradoksajn Rememorojn.

La 4an Pjotr De Mulder elokvente, vive, pasie kaj spontanee rakontis pri siaj spertoj ĉe la Verdaj Skoltoj kaj ilustris tion per trafikaj bildoj. Dume li prilumis ĝiajn celojn, la konsiston, la organizajn kutimojn kaj fine ankaŭ subteneblecojn. Li i.a. alvokis por partopreni en PEKO - ĉar la gajno de tiu aranĝo permesas diversajn iniciatojn - kaj signalii kiam vi konas kontaktendajn junulojn inter 11 kaj 18-jaraĝaj. Ni ege ĝuis la prezentadon.

18-08-2017 - André Staes: Paradoksaj rememoroj pri okazonta vojaĝo al Kopenhago - 25-08 - Yves Nevelsteen: interaktiva prelego pri komputilaĵoj kaj interesaj projektoj

Venontan vendredon, la 18-an de aŭgusto je la 20-a horo André Staes, iom antaŭ sia rea vizito al Kopenhago, rakontos Paradoksajn Rememorojn: "Kion Esperantisto povas lerni de la diskuto inter Kierkegaard kaj H.C. Andersen?" En siaj prelegoj, André kutimas prezenti tre originalajn ideojn spicitaj de humuro. Do certe ne maltrafu tiun oratoradon!

La 25an vi ankaŭ jam rezervu en via agendo kiam Yves Nevelsteen prizorgos interaktivan prelegon. Multaj membroj havas demandojn pri komputilaĵoj kaj ne sufiĉe konas novajn eblecojn. Temos interalie pri ĉapelitaj literoj, vortaroj, lerniloj, aŭdvideaĵoj kaj Amikumu. Multaj novaj iniciatoj aperis post la lanĉo de Duolingo; apenaŭ eblas sekvi la evoluojn. Yves donos superrigardon de tio kion li ĝis nun malkovris kaj taksas interesa.

La 14an de julio, Vilhelmo Lutermano prelegis en nia klubo pri la esperantlingva eldono de la Unesco Kuriero. Nun eblas aĉeti la paperon version de la 1a numero ĉe la libroservo de UEA. Sed ĝi estas senpage elŝutebla ĉe http://uea.org/pdf/Unesko-Kuriero_1-2017.pdf. Belaspekta, riĉenhava, prestiĝa!

Hieraŭ, la 11an de aŭgusto, Raf montris fotojn pri SES (la Someraj Esperanto-Studoj) en Banska Štiavnica (Slovakio) kaj dume detale rakontis pri la vojaĝo, la kursoj (190 aliĝintoj!) kaj la eksursoj. Chris aldonis detalojn pri ĉi-foje tre malmultnombra OSIEK-konferenco, kiu okazis samloke. Post la paŭzo, Ella kaj Eddy rakontis pri la Kultura Esperanto-Kurso en Lesjöfors (Svedio). Ili jam planas reiri venontan jaron por tiu tre internacia kaj varia kultura festivalo.

25-08-2017 - Yves Nevelsteen: komputilaj projektoj kaj novaj retaj disvolviĝoj

Venontan vendredon, la 25an de aŭgusto 2017 je la 20-a horo, Yves Nevelsteen organizos "interaktivan prelegon pri komputilaj projektoj kaj novaj retaj disvolviĝoj. Temos interalie pri ĉapelitaj literoj, vortaroj, lerniloj, aŭdvideaĵoj kaj Amikumu. Multaj novaj iniciatoj aperis post la lanĉo de Duolingo; apenaŭ eblas sekvi la evoluojn. Yves donos superrigardon de tio kion li ĝis nun malkovris kaj taksas interesa."

Vi – kiel ricevanto de tiu ĉi novaĵletero – sendube tre ofte uzas vian komputilon por informiĝi kaj por viaj kontaktoj. Sed malmultaj membroj povas daŭre sekvi la novajn eblecojn kaj disvolviĝojn. Ni havos idealan eblecon por profiti de bone informita specialisto por plie informiĝi kaj lerni. Venu kaj starigu viajn demandojn.

Dimanĉon, la 27-an de aŭgusto inter la 14a kaj 17a, ni reprenas la tradicion de dimanĉaj kunvenoj. Lastatempe ne plu necesaj materialoj estas forportitaj el la kunvensalono. Nun la aspekto estas multe pli alloga. Se vi ne jam vidis ĝin, venu do al nia "Ferio-festo": Ella bakos patkukojn kaj dume eblas konversacii kun amikoj. Jam eblas vidi kelkajn fotojn pri la nuna aspekto de la ejo ĉe <http://esperanto-antwerpen.weebly.com/sidejo-zetel.html>

Nia klubo prizorgos informan budon en Cultuurbeurs (Steenplein). Deĵorintojn de la budo kaj eble nov-interesitojn ni ankaŭ atendas en la klubejo. Venu kaj kunĝuu.

Pasintan vendredon, André Staes surprizis nin per bildoj kaj detala mapa pri Kopenhago, sed uzis tion precipe por havigi tre konkretan bildon pri la tiea vivo de Hans Christian Andersen kaj pri la tensioj kun samtempulo Kierkegaard. Agrabla, amuza sed ankaŭ tre instrua prelego.

27-08-2017: Feriofesto - 1+8-09-2017: raportoj pri kongresoj kaj renkontiĝoj

Dimanĉon la 27-an de aŭgusto nia klubo prizorgas informan budon dum "Cultuurbeürs" ĉe Steenplein, precipe por varbi novajn interesitojn por la informa vespero kaj kurso por komencantoj en septembro. Sed ni atendas la klubanojn en nia kunvenejo inter la 14-a kaj 17-a por neformalaj babiloj kaj eventuale ankaŭ por renkonti nov-interesitojn, sekve de la informa agado en nia budo. Ella bakos patkukojn kaj tiel ni travivos tre plaĉan vivan posttagmezon.

La 1-an kaj la 8-an de aŭgusto, ekde la 20-a horo ni atendas raportojn pri diversaj ĉi-someraj kongresoj kaj renkontiĝoj. Bv. informi min kiam vi povas raporti pri viaj travivaĵoj en Esperantio. Iuj membroj reagis ke ili ne jam havis sufiĉe da tempo por ordigi kaj elekti fotojn kaj skribi raporton. Sed ni ne atendas veran prelegon sed almenaŭ unuajn impresojn, laŭeble ilustritajn per kelkaj trafikaj fotoj. Do mi alvokas ĉiun, kiu partoprenis renkontiĝon por almenaŭ iom rakonti pri tio. Kaj bv. anticipi informi min pri kio vi povus paroli kaj kiom da tempo ni antaŭvidu. Iam poste en la jaro, ni povus programi tutvesperan programon pri la UK en Seulo kaj pri la aventura vojaĝo tien per transsiberia trajno.

La 25-an Yves Nevelsteen prezentis superrigardon pri la surprize multaj, variaj kaj riĉenhavaj eblecoj en interreto. Dum la prezentado, li diversfoje demandis al ni, tamen aktivaj klubanoj: "Kiu ne jam konis tiun ĉi reteblecon?" kaj regule leviĝis preskaŭ ĉiuj fingroj! Tiel montriĝis ke paralele kun aktivaj kluboj ekzistas amaso da plej interesaj eblecoj por informado kaj praktikado, kiun oni povas uzi hejme pere de komputilo. Ankaŭ evidentiĝis ke tiom riĉa spektro da sufiĉe novaj eblecoj nur eblas pro armeeto da volontuloj kaj tio montras novan dinamismon en la Esperanto-movado.

Mi povas laŭdezire postsendi liston da ligiloj, kiujn Yves disponigis al ni. La temo estas tiom abunda kaj interesa, ke ni ellaboros planon por interaktiva dimanĉa kunveno (supozeble la lastan dimanĉon de oktobro), kiam interesitoj kunportos sian poŝkomputilon kaj grupiĝos ĉirkaŭ Yves por aktive konatiĝi kun ĉiuj tiuj eblecoj.

08-09-2017: Rakoen Maertens - Raportoj pri IJK en Aneho kaj UK en Seulo + MANGBLECO - 15-09-2017: Lode Van de Velde - Verkado de Hajkoj

Venontan vendredon, la 8an de septembro je la 20-a horo, Rakoen Maertens rakontos pri siaj spertoj dum la IJK en Aneho/Togo kaj la UK en Seulo/Suda Koreio. Evidente li kunportos fotoserion.

Ĉar Rakoen venas de Brugge, ni ofertas manĝon je la 18h30. Vi povas partopreni ĝin se vi anoncas vin ĝis jaŭdo tagmeze: 03 234 34 00 aŭ financoj@fel.esperanto.be.

La 15an Lode Van de Velde enkondukos nin en la tradicion kaj la bazajn regulojn de Hajkoj kaj havigas konsilojn. Poste li proponas komencan frazon kaj la ĉeestantoj – sen ia devigo – mem produkti tian trilinean poemeton. Poste sekvos komparo. Lode jam prezentis tiun ĉi programon kaj ni reprenas ĝin pro la tiama kreiva, entuziasma etoso en la salono.

Pasintan vendredon, Eddy Raats rakontis kiel li sukcesis postkongrese trakrozi Litovion pere de kontaktoj, kiuj kreiĝis dum la UK en Vilnius. Poste Rob Ebenau montris kaj prikomentis siajn fotojn pri la UK en Seulo. Tre varia, informriĉa vespero pri personaj kaj tamen inspiraj spertoj.

ĈU ESPERANTO-TRAJNO EN POLLANDO?

Ankaŭ vi povas helpi per via voĉdono!

La interurbaj IC-traĵnoj havas proprajn nomojn ankaŭ en Pollando, kaj ofte oni decidas pri ili per voĉdonado. Ankaŭ nun, ekde unu semajno daŭras publika voĉdonado pri la trajno trafikonta inter la urboj Białystok kaj Łódź. Por la nomo estas tri kandidatoj: 1. Jagiellonczyk 2. Esperanto 3. Branicka

Polaj esperantistoj ŝatus, se la trajno portus la nomon "Esperanto" – kaj bonvenigas voĉdonan helpon ankaŭ de eksterlandanoj – kiuj ja same povos veturi per tiu trajno.

Se vi ŝatas kaj subtenas la ideon, kiel voĉdono simple metu signon en la komenco de la linio de la trajno-nomo Esperanto en la suba paĝo (por havi la eblon voĉdoni vi devas esti membro de Facebook):

<https://www.facebook.com/Ret.Info/posts/1476969229049181>

15-09-2017 - Lode Van de Velde: Hajkoj; 22-09-2017 - Yves Nevelsteen: Informoj por kursemuloj - Bernard Regis-Larue: Henri La Fontaine kaj Paŭl Otlet (1a p)+MANGEBLECO

Vendredon, la 15-an de septembro je la 20-a horo Lode Van de Velde enkondukos nin en la tradicion kaj la bazajn regulojn de Hajkoj kaj havigas konsilojn. Poste li proponas komencan frazon kaj la ĉeestantoj – sen ia devigo - mem produktu tian trilian poemeton. Poste sekvas komparo. Lode jam prezentis tiun ĉi programon kaj ni reprenas ĝin pro la tiama kreiva, entuziasma etoso en la salono.

La 22-an, je la 17-a horo Yves Nevelsteen prizorgas informan sesion por interesitoj pri Esperanto-kurso. La kurso komenciĝos la 6an de oktobro. Se vi konas interesiton, venigu lin tien!

Je la 20-a horo Bernard Regis-Larue prelegos pri 2 rimarkindaj sed apenaŭ konataj bruselanoj: Henri La Fontaine kaj Paŭl Otlet. Ili kreis la Mundaneŭm aŭ Monda-n Palaco-n, kie ariĝis diversaj asocioj kaj institucioj kiujn ili kreis. Ili ĉefe agadis en kampoj de bibliografio kaj paco kaj tiuj du temoj donas du prelegojn. Sed ili inventis kaj kunkreis nekredoblan nombron da aferoj, plurajn daŭre funkciajn kaj uzatajn. Nun ni aŭdos la unuan parton.

Pasintan vendredon, Rakoen Maertens tre vive kaj plentuziasme parolis pri siaj (kultur)ŝokaj spertoj en la IJK en Aneho/Togolando. Post la paŭzo li raportis pri la UK en la luksa kaj teknologie tre evoluinta Seulo/Koreio. Pli granda kontrasto apenaŭ imageblas. Estiĝis entuziasmiga kaj viva konversacio inter Ragoen kaj la ĉeestantaro. Engaĝita Ragoen rakontis pri siaj ambicioj kaj spertoj en Esperantio sed samtempe informiĝis pri okazaĵoj kiujn li mem ne travivis. Denove ni spertis kiel 1 juna entuziasmulo povas vigligi la etoson en niaj tradiciaj kunvenoj.

Vizitu regule nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen por aktualaj informoj kaj amikiĝu kun ni en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>

22-09-2017 - Bernard Regis-Larue: Henri La fontaine kaj Paŭl Otlet (1a parto)
- 29-09-2017 - Eddy Raats: Vivo kaj Spertoj de Orkestromuzikisto

Venontan vendredon, la 22-an de septembro, je la 20-a horo Bernard Regis-Larue prelegos pri 2 rimarkindaj sed apenaŭ konataj bruselanoj: Henri La Fontaine kaj Paŭl Otlet. Ili kreis la Mundaneŭm aŭ Monda-n Palaco-n, kie ariĝis diversaj asocioj kaj institucioj kiujn ili kreis. Ili ĉefe agadis en kampoj de bibliografio kaj paco kaj tiuj du temoj donas du prelegojn. Sed ili inventis kaj kunkreis nekredeblan nombron da aferoj kaj pluraj estas daŭre funkciaj kaj uzataj.

Inter la 17-a kaj 18:30-a horoj Yves Nevelsteen prizorgos informan sesion por interesitoj pri Esperanto-kurso. La kurso komenciĝos la 6-an de oktobro. Se vi konas interesiton, venigu lin tien!

Kaj je la 18:30-a vi povos ĝui la kutiman festan vespermanĝon sed vi anoncu vin se vi volas partopreni ĝis jaŭdo tagmeze: financoj@fel.esperanto.be aŭ 03 234 34 00.

La 29-an Eddy Raats dividos kun ni privatajn spertojn en sia prelego: "Vivo kaj Spertoj de Orkestromuzikisto". Studoj, prospero kaj rmalprogreso, belaj kaj malbelaj flankoj. Profesia- kaj progresinta-amatora eksmuzikistoj rakontas.

Pasintan vendredon Lode Van de Velde denove instigis nin por ne nur konatiĝi kun "Hajkoj", la japana poemtradicio, sed ankaŭ praktiki ĝin. Okazis rimarkinda fenomeno: escepte de Chris kaj Lode, oni ne povas imagi ke niaj membroj dum vendredo-vespero spontane okupiĝas pri poemverkado. Kaj tamen ĉi-foje, post la enkonduka parto, la ĉeestantoj koncentrite kaj energiplene okupiĝis pri verkado de Hajkoj kun surprizaj rezultoj. Ĉi sube sekvas kelkaj ekzemploj.

*Tagiĝa suno
saluton sendas al la
forfada luno*

Chris Declerck

*Hastemaj paŝoj
al urĝa rendevuo
neĝo glitiga*

Eddy Van den Bosch

*Preterbiciklis
malvarma vento blovis
ho ve, ne mia!*

Ivo Durwael (post samtaga bicikloŝtelo)

*Ŝtupar' senĉesa
sakoj pezas pli kaj pli
mi volas lifton*

Klaas Dijkstra

29-09-2017: Eddy Raats: Vivo kaj sperto de orkestromuzikisto

6-10-2017: Bernard Regis-Larue: Henri La Fontaine kaj Paŭl Otlet - 2a parto

Venontan vendredon, la 29-an de septembro je la 20-a horo, Eddy Raats rakontos pri la spertoj de profesia amiko-orkestromuzikisto kaj aldonos siajn spertojn kiel amatora muzikisto, kiu ofte anstataŭis profesiajn.

Pasintan vendredon, Bernard mirigis nin per la vivrakonto de du forgesitaj belgoj, nome Henri La Fontaine kaj Paŭl Otlet, kiuj iniciatis nekredeblan kvanton da aferoj precipe en la kampoj de bibliografio kaj paco, kiuj estis mondscale aplikataj kaj eĉ bazo por multaj nuntempaj novaj aplikoj. Ĉi-foje li prilumis precipe la bibliografiajn iniciatojn. Paŭl Otlet eĉ kunlaboris kun Sébert kaj iuj opinias eĉ ke ili konatiĝis kiel esperantistoj.

La 5-an de oktobro, Bernard daŭrigos sian rakonton kaj ĉi-foje prilumos la porpacajn iniciatojn.

Pluraj membroj volas iel kontribui por la fina enordigo de la nova sidejo kaj demandis pri konkretaj subtenindaj proponoj. Antaŭ ol pendigi la grandan ekranon kaj projekciilon, LVS ŝatus aĉeti novan modernan projekciilon, la meblon por pendigi ĝin ĉe la plafono kaj la necesajn konektilojn por diversspecaj komputiloj. Tio entute kostos proks. 500 eŭroj. Por tiu celo oni povas donaci al la konto de FEL BE31 4025 5105 3155. Nepre aldonu la mencion "GIFT beamer" se vi volas ateston por via impostdeklaro.

**06-10-2017 - Bernard Regis-Larue: Henri La fontaine kaj Paŭl Otlet (2a parto)
- Komenciĝo de nova kurso - 16-10-2017 - André Staes: Lingva Konscio - Ĉu Esperanto povas helpi al multlingvismo?**

Venontan vendredon, la 6-an de oktobro je la 18-a horo komenciĝos la unua leciono de Esperanto-kurso por komencantoj sub gvido de Yves Nevelsteen.

Je la 20-a Bernard Regis-Larue prezentos la duan parton de sia prelego. Ĉi-foje li ĉefe prilumos la porpacajn iniciatojn de La Fontaine kaj Otlet.

La 13an de oktobro je la 20-a André Staes formulos siajn konkludojn de lia 60-paĝa disertacio pri "La Lingvokonsciiga Rolo de Esperanto".

Pasintan vendredon Eddy Raats prizorgis tre plaĉan kaj interesan programon. Dum la tuta prezentado aŭdigiĝis bela muziko en la fono, ludita per diversaj orkestroj kaj en variaj interpretadoj. Dume Eddy malfermis por la publiko nekonatajn facetojn en la vivo de orkestromuzikisto.

Ĝis la jarfino oni povas aliĝi al la UK-2018 en Lisbono je la plej malalta prezo. Tio eblas per jena ligo: http://uea.org/pdf/uk218/unua_bulteno_2018.pdf

13-10-2017 - André Staes: Lingva Konscio: Ĉu Esperanto povos helpi al Multlingvismo? - 20-10-2017 - Lode Van de Velde: Amuza Matematiko - DANKON DONACINTOJ!

La 13-an de oktobro je la 20-a André Staes prelegos pri "Lingva Konscio: Ĉu Esperanto povos helpi al Multlingvismo?" Por sia disertacio, André profunde pristudis la analizojn, testojn, eksperimentojn ... por esplori la eblajn efikojn de Esperanto en nia socia vivo. André estas tre agrabla, talenta preleganto kiu povas prezenti faktojn en tre agrabla maniero.

La 20-an Lode Van de Velde surprizos multajn per sia prezento pri "Amuza Matematiko". Ofte lingvemuloj malŝatas matematikon, sed Lode montros interesajn aspektojn de matematiko, kompreneblaj por laikoj kaj alternativajn, pli facilajn kalkulmanierojn.

Pasintan vendredon komenciĝis nova Esperanto kurso kaj Yves Nevelsteen ekinicis 7 novulojn. Venonta kursotago estos la 20-a de oktobro, sed intertempe la kursanoj jam ekzercos kun la kursgvidanto per skajpado.

Post la kurso Bernard-Regis Larue unue resumis la jam prezentitan parton de sia prelego pri Henri La Fontaine kaj Paŭl Otlet kaj poste prilumis ankoraŭ amasegon da pliaj iniciatoj kaj realigoj bibliografiaj kaj porpacaj de tiuj mirindaj kaj tamen apenaŭ konataj personoj. Multaj nuntempaj atingoj kiaj Vikipedio, -medio, -libroj, -datumoj, eŭropaj kaj mondaj organizaĵoj ... originis el iliaj iniciatoj. Menciindas ke La Fontaine ankaŭ fondis framasonajn ĉelojn en Belgio kaj ke la titolo de la informa broŝuro estas en Esperanto. Vere surprize estas ke Otlet, jam en la tridekaj jaroj, vizie priskribas la nuntempajn elektronikajn realigojn. Ni dankas al Bernard ke li konigis al ni tiujn personojn, kiuj ŝajne disponis pri 48 horoj en tago.

Ni volas elkore danki ĉiujn membrojn, kiuj reagis al nia alvoko pri nova projekciilo per mondonaco. Dank'al tiuj donacoj nun eblas aĉeti kaj instali ĝin. Tio estas plia paŝo por pli komfortaj prezentadoj en nia kunvensalono.

20-10-2017 - Lode Van de Velde: Amuza Matematiko; 27-10-2017 - Martin Ptasinsky (DE): Slavaj Interlingvoj

Venontan vendredon, la 20-an de oktobro, de la 18h ĝis la 19h30 Yves Nevelsteen gvidos la duan kursotagon por komencantoj.

Je la 20h Lode Van de Velde surprizos nin per sia prezento pri "Amuza Matematiko". Ofte lingvemuloj malŝatas matematikon, sed Lode montros interesajn aspektojn de matematiko kompreneblaj por laikoj, kaj alternativajn pli facilajn kalkulmanierojn. Tiu prelego certe enhavos konkretajn konsilojn por ĉiu ajn.

Vendredon la 27-an, Martin Ptasinsky (DE) parolos pri "Slavaj Interlingvoj". Temas pri planlingvoj surbaze de slavaj lingvoj, kiel Slovio (Esperanto kun slava vortprovizo) kaj Interslava (laŭ modelo de Interlingvao). La unuaj projektoj pri interslava lingvo aperis jam meze de la 19-a jarcento, do estas eĉ pli maljunaj ol Esperanto mem aŭ Volapük. Martin estas regula gastpreleganto en nia klubo. Ĉiufoje li surprizas nin per informoj pri lingvaj fenomenoj kaj tendencoj tute ne konataj de nefakuloj.

Pasintan vendredon, André Staes donis superrigardon pri liaj esploroj rilate al kelkdek eksperimentoj por pristudi la efikojn de Esperanto-instruado al aliaj kursoj. Staes ellaboris klaran superrigardon kun la jaro(j), daŭro, lokoj, iniciatinto, celo(j),

eventuala univertitata subteno kaj rezultoj. Resume evidentiĝas ke la emfazo en tiuj eksperimentoj pli transiras de "lernplifacila rolo" al "lingvokonsciiga rolo". André mem defendas la iniciaton de tre mallongaj kursoj en bazaj lernejoj kun la espero ke la interesiĝo – kiel semo – ekĝermos kiam infanoj pli konscie ekstudos fremdlingvojn.

La plimulto de niaj klubanoj konas la nun emeritan oficiston de la E-centro en Frankrijk, Jean-Pierre Van den Daele. Li nun sciigis ke oni trovis malican kanceron ĉe pulmo. Feliĉe Jean-Pierre mem akcepteme reagis al la malagrabla novaĵo en telefona konversacio kun Gerd kaj petis por diskonigi la novaĵon al konatoj.

27-10-2017 - Martin Ptasinsky (DE): "Slavaj interlingvoj" (MANĜEBLECO) - 3-11-2017 - Eddy Van den Bosch: Riskokvizo

Venontan vendredon, la 27-an de oktobro je la 20-a horo, Martin Ptasinsky (DE) parolos pri "Slavaj Interlingvoj". Temas pri planlingvoj surbaze de slavaj lingvoj, kiel Slovio (Esperanto kun slava vortprovizo) kaj Interoslava (laŭ modelo de Interlingvao). La unuaj projektoj pri interoslava lingvo aperis jam meze de la 19-a jarcento, do estas eĉ pli maljunaj ol Esperanto mem aŭ Volapük.

Martin estas regula gastpreleganto en nia klubo. Ĉiufoje li surprizas nin per informoj pri lingvaj fenomenoj kaj tendencoj tute ne konataj de nefakuloj. Do nepraĵo por ĉiu, kiu interesiĝas pri planlingvoj.

Eblas vespermanĝi en la klubejo je la 18h30 sed vi anoncu vian partoprenon ĝis ĵaŭdo tagmeze: financoj@fel.esperanto.be aŭ tel. 03 234 34 00.

La 3-an de novembro Eddy Van den Bosch denove prezentos la ege ŝatatan "riskokvizon".

Pasintan vendredon, Lode Van de Velde prelegis pri "Amuza Matematiko". Unue li donis detalan historian superrigardon pri la diversaj cifer- kaj kalkulmetodoj sur nia terĝlobo. Poste li surprizis nin per mirindaĵoj kiel fraktaloj, Fibonacci-serioj, ora proporcio, triangulo de Pascal, k.s. Admirinda estas kiel tiaj kalkuloj retroveblas en naturaj fenomenoj. Fine Lode instruis al ni kiel konstrui magian kvadraton por amuzi kaj imponi amikojn. Do, ni ĝuis riĉenhavan "magian" prezentaĵon.

03-11-2017 - Eddy Van den Bosch: Riskokvizo - 10-11 - Leontine Janssens: Farado de Bondezirkartoj - DIMANĈO POSTTAGMEZE 12 -11 - Yves Nevelsteen: interretaj eblecoj + neformala babilado

Proksiman vendredon, la 3-an de oktobro je la 20-a horo, Eddy Van den Bosch denove prezentos sian popularan "Riskokvizon". Oni formas grupetojn po 3/4 personoj por respondi demandojn rilate al Esperanto. Sed per ruzo kaj bonŝanco, malpli sukcesa grupeto povas tamen gajni. Kaj gajneblas allogaj premioj.

La 10-an de novembro Leontine Janssens kun la helpo de Nicky Janssen gvidas laborgrupon por mem fari bondezirkartojn. Leontine mem alportas la necesajn kaj abundajn erojn por realigi tion. Kiu ne ŝatas manlabori povas praktiki konversacion en Esperanto.

De la 18h ĝis la 19h30 okazos la tria leciono de la kurso por komencantoj.

Dimanĉon, la 12-an de novembro de la 14h ĝis la 17h, ni proponas duoblan programon. Nia klubo jam organizis serion da neformalaj dimanĉaj kunvenoj speciale por homoj kiuj ne povas partopreni la vendredajn programojn. Sed ĉi-foje aldoniĝas tre interesa programero. Jam en septembro, Yves Nevelsteen parolis pri la multegaj kaj nesufiĉe konataj interretaj eblecoj. Sed evidentiĝas ke pluraj membroj konfrontiĝas kun problemoj kaj bezonas konkretan asiston. Nun prezentiĝas tre bela solvo: kunportu vian propran porteblan komputilon, poŝkomputilon aŭ poŝtelefonon kaj Yves denove prezentos eblecojn, kiujn vi tuj povas elprovi. Jam anticipu notu viajn demandojn kaj Yves provos solvi tion por kaj kun vi! Ne maltrafu tiun belan helpeblecon!

Pasintan vendredon, Martin Ptasinsky (DE) prezentis fenomenon, kiu supozeble tute ne estas konata al okcident-eŭropanoj: la pli ol miljaraj provoj por trovi interlingvon por slavo, kiuj ja reprezentas 40 % de la eŭropa loĝantaro sed distranciĝas en amaso da ŝtatoj en eŭropo. La slavona estis la unua skribita interlingvo, sed Martin parolis pri 69 interlingvoj pli-malpli sukcesaj kaj eĉ post Slovio, kiu datas de la fino de la 20-a jc. ankoraŭ aperis 36 projektoj. Evidentiĝis ke ili funkcias ĉar Ella kaj Natasja sukcesis kompeni kelkajn tekstojn en tiuj interlingvoj sen iu antaŭscio. Do denove kleriga ege interesa prelego!

Ĉe www.hungaromania.eŭ/nl vi povas nun jam trovi informojn pri Hungaromania en la Semajno de Internacia Amikeco (Leŭven, 25-02-2018).

10-11-2017 - Leontine Janssens: Farado de bondezirkartoj - DIMANĈO 12-11 - Yves Nevelsteen: Interretaj eblecoj + neformala babilado - 17-11 - Mirija Belosevic (HR): Kroataj urboj, kulturo kaj tradicioj

Proksiman vendredon, la 10an de novembro je la 20-a horo Leontine Janssens kun la helpo de Nicky Janssen gvidas laborgrupon por mem fari bondezirkartojn. Leontine mem alportas la necesajn kaj abundajn erojn por realigi tion. Kiu ne ŝatas manlabori povas praktiki konversacion en Esperanto. De la 18a ĝis la 19:30a okazos la 3a leciono de la kurso por komencantoj.

Dimanĉon, la 12an de novembro de la 14a ĝis la 17a, ni proponas duoblan programon. Nia klubo jam organizis serion da neformalaj dimanĉaj kunvenoj speciale por homoj kiuj ne povas partopreni la vendredajn programojn. Sed ĉi-foje aldoniĝas tre interesa programero. Jam en septembro, Yves Nevelsteen parolis pri la multegaj kaj nesufiĉe konataj interretaj eblecoj. Sed evidentiĝas ke pluraj membroj konfrontiĝas kun problemoj kaj bezonas konkretan asiston. Nun prezentiĝas tre bela solvo: kunportu vian propran porteblan komputilon, poŝkomputilon aŭ poŝtelefonon kaj Yves denove prezentos eblecojn, kiujn vi tuj povas elprovi. Jam anticipu notu viajn demandojn kaj Yves provos solvi tion por kaj kun vi! Ne maltrafu tiun belan helpeblecon!

Vendredon, la 17an Marija Belosevic (HR) prelegos pri sia lando. Ŝi montros bildojn pri kelkaj urboj kaj ilia kultura heredaĵo sed speciale atentigos pri specifaj tradicioj. La postan tagon ŝi partoprenos en la malferma tago de la Centra Oficejo en Rotterdam.

Pasintan vendredon la 5 ĉeestantoj (i.a. 3 klubaj estraranoj) rezignis pri la kvizo kaj preferis babilu kaj cerbumi pri klubaj aktivecoj kaj pri la disvolviĝo de la rilatoj kun FEL. Espereble Eddy Van den Bosch povos tamen prezenti tiun ĉi kvizon en la venonta jaro.

Vizitu regule nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen por aktualaj informoj kaj amikiĝu kun ni en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>

17-11-2017 - KOREKTO - Frans Meul: Promenadoj laŭ GR-padoj

Egan pardonpeton! Miaj kadukiĝantoj okuloj pretersaltis linion en nia programo kaj sekve mi dissendis eraran komunikon.

Vendredon, la 17-an de novembro Frans Meul prelegos pri "Promenadoj laŭ GR-padoj" kaj li aldonis jenan klarigon: Ĉu vi jam rimarkis blankajn-ruĝajn striojn sur arboj dum viaj promenadoj tra arbaroj? Estas indikiloj de longdistancaj promenvojoj, la tiel nomataj GR-padoj. Dum la lastaj jaroj mi sekvis tiujn idikilojn tra Flandrio kaj Nederlando por pli ol mil kilometroj. Mi rakontos pri la historio de tiu retejo kaj pri miaj propraj spertoj (strangaĵoj, obstakloj, vidindaĵoj...) akompanata de multaj fotoj.

Marija Belosevic prelegos la 24-an de novembro kaj la malferma tago de UEA estos la 25-a.

12-11-2017 - Yves Nivelsteen: Interretaj Eblecoj - 17-11 - Frans Meul: Promenadoj laŭ GR-padoj - 24-11 - Marija Belosevic: Kroataj urboj, kulturo kaj tradicioj

Vendredon, la 17-an de novembro Frans Meul prelegos pri "Promenadoj laŭ GR-padoj" kaj li aldonis jenan klarigon: Ĉu vi jam rimarkis blankajn-ruĝajn striojn sur arboj dum viaj promenadoj tra arbaroj? Estas indikiloj de longdistancaj promenvojoj, la tiel nomataj GR-padoj. Dum la lastaj jaroj mi sekvis tiujn idikilojn tra Flandrio kaj Nederlando por pli ol mil kilometroj. Mi rakontos pri la historio de tiu retejo kaj pri miaj propraj spertoj (strangaĵoj, obstakloj, vidindaĵoj...) akompanata de multaj fotoj.

Vendredon, la 24-an Marija Belosevic (HR) prelegos pri sia lando. Ŝi montros bildojn pri kelkaj urboj kaj ilia kultura heredaĵo sed speciale atentigos pri specifaj tradicioj. La postan tagon ŝi partoprenos en la malferma tago de la Centra Oficejo en Rotterdam.

Pasintan vendredon la salono denove pleniĝis per grupo da homoj, kiuj volas eluzi sian kreivecon per fabrikado de bondezirkartoj helpe de la amaso da materialo kaj de la ekzemploj, kiun Leontine Janssens kunportis. Tiuj aktivecoj de Leontine ĉiujare alportas homojn, kiuj ne aperas por prelegoj. Ni tre esperas ke Leontine do daŭrigos la belan tradicion.

Dimanĉe inter la 14h kaj 17h, 11 personoj anoncis sin por ricevi instruon de Yves Nivelsteen. Sed Yves kunportis 3 tute novajn broŝurojn: Esperanto en Internet (€ 1) kaj du volumoj de Eksterrete (resp € 2 kaj € 3 ĉe www.komputeko.net/eksterrete). Tio ŝparis al ni la penon noti ĉar ili enhavas amason da interesaj informoj pri la temo. En la unua parto Yves montris aron da eblecoj kaj havigis konsilojn por pli bone orientiĝi en la amaso da eblecoj. Post paŭzo li solvis personajn problemojn de la ĉeestantoj. Sed adaptoj en komputiloj bezonas tempon. Yves ne traktis atendis sed okupiĝis pri pluraj problemoj samtempe. Mi havas la impreson ke ĉiuj ĉeestantoj ege kontentis pri sia partopreno kaj Yves kontentis pri la eĥoj. Nepre refarenda!

Vizitu regule nian retpaĝon www.esperanto.be/antwerpen por aktualaj informoj kaj amikiĝu kun ni en Facebook: <https://www.facebook.com/La-Verda-Stelo-Antverpeno-191866214182328/>

Ivo Durwael.

24-11-2017 - Marija Belosevic (HR): Marija Belosevic: Kroataj urboj, kulturo kaj tradicioj - 1-12 - Helmut Klünder (DE): Orientfrisaj Insuloj kaj la influo de la tajdo

Venontan vendredon, la 24-an de novembro je la 20-a horo Marija Belosevic (HR) prelegos pri sia lando. Ŝi montros bildojn pri kelkaj urboj kaj ilia kultura heredaĵo sed speciale atentigos pri specifaj tradicioj. La postan tagon ŝi partoprenos en la malferma tago de la Centra Oficejo en Rotterdam.

Vi povos manĝi en la klubejo je la 18h30, sed vi anoncu vian partoprenon ĝis ĵaŭdo la 23-an de novembro tagmeze: 03 234 34 00 aŭ financoj@fel.esperanto.be. La kurso por komencantoj forfalas. La venonta kursotago estos je 8-12.

La 1an de decembro Helmut Klünder (DE) rakontos pri la influo de la tajdo ĉe la orientfrisaj insuloj. Unue li montros 100 fotojn kaj grafikaĵojn de la insuloj kaj prilumos la funkciadon de la tajdo kaj la geomorfologian influon al la insuloj. La dua parto temas pri la influo al la homa vivo sur la insuloj. Helmut montros fotojn de unu el la insuloj kaj gustigos tipajn alkoholaĵojn. Ankaŭ tiun vesperon eblas manĝi en la klubejo.

Ekzistas ebleco por baldaŭ transporti donacojn por la baza lernejo Jules Verstraeten ĝis 15 kg-j: pensu pri skribiloj, kajeroj, pilkoj ... kaj eventuale valizeto aŭ fermebla sako (kiu restos surloke!). Kiu volas donaci ion povas alporti materialojn al la E-centro aŭ ĉe Agnes Geelen.

Nicky Janssen pretas akcepti plian kunveturanton al la vespera Zamenhoffesto en Lille la 9-an de decembro. Oni tranoktos ĉe esperantistoj.

Ne forgesu aliĝi al la Nacia Zamenhoffesto en Bruselo la 16an de decembro: https://docs.google.com/forms/d/e/1FAIpQLSf9dESHtJn397jk6HKWcxIlisi26p08h_kGikVS7rqP8_0rxQ/viewform.

Ĉi vespere Frans Meul prezentis tre allogan kaj varian programon pri la long-distancaj promenvojoj (GR-vojoj). Frans skizis la historion kaj la disvolviĝon. Poste li raportis pri propraj spertoj kaj aventuroj kun trafikaj bildoj. Post la paŭzo li montris serion da strangaĵoj i.a. en loknomoj, en monumentoj kaj objektoj kaj li finis per serio da idiliaj pejzaĝoj.

01-12-2017 - Helmut Klünder (DE): Orientfrisaj Insuloj kaj la Influo de la Tajdo - 8-12 - Paŭl Peeraerts: De simpla Bultenejo al giganta Retejo

Venontan vendredon, la 1an de decembro je la 20-a horo certe ne maltrafu la prelegon de Helmut Klünder (DE). Personoj, kiuj jam aŭdis ĝin aliloke asertas ke tiu zorgo kunmetita kaj science bazita prelego estos iu el la plej eminentaj en nia klubo. Helmut montros 100 fotojn kaj grafikaĵojn de la insuloj kaj prilumos la funkciadon de la tajdo kaj la geomorfologian influon al la insuloj. La dua parto temas pri la influo al la homo vivo sur la insuloj. Helmut montros fotojn de unu el la insuloj kaj gustigos tipajn alkoholaĵojn.

Je la 18h30 vi povos jam manĝi kune kun la gastpreleganto sed vi antaŭmenu: financoj@fel.esperanto.be aŭ 03-234 32 00.

La 8-an de decembro Paŭl Peeraerts rakontos pri la surpriza disvolviĝo de la retejo de FEL. Flandra Esperanto-Ligo gastigas en sia servilo unu el la plej grandaj esperantlingvaj

tekstokolektoj. Sub ĝiaj tri tegmentoj esperanto.be, monato.net kaj retbutiko.net legeblas nun 2000 librorecenzoj, 3000 libropriskriboj kun same multe da fotoj, 5000 tekstoj el Monato ... La embrio de tiu giganta tekstaro ekestis precize antaŭ 25 jaroj, per unu malgranda komputileto. Paŭl Peeraerts, kiu dekomence sekvis la evoluon, parolos pri tiu 25-jara historio.

Pasintan vendredon, Marija Belosevic (HR) rakontis pri sia hejmlando Kroatio kaj i.a. prilumis la folklorajn tradiciojn de buntaj vestaĵoj, dancado kaj muziko tre specifaj kaj ankoraŭ tre vivaj, ne nur por plaĉi al turistoj sed ankaŭ en la ĉiutaga vivo en la Kroatio.

8-12-2017 - Paŭl Peeraerts: De simpla bultenejo al giganta retejo - 15-12 - Salono fermita - 16-12 Belga Zamenhoffesto en Bruselo

Venontan vendredon, la 8-an de decembro je la 20-a horo, Paŭl Peeraerts rakontos pri la surpriza disvolviĝo de la retpaĝoj de FEL. Flandra Esperanto-Ligo gastigas en sia servilo unu el la plej grandaj esperantlingvaj tekstokolektoj. Sub ĝiaj tri tegmentoj esperanto.be, monato.net kaj retbutiko.net legeblas nun 2000 librorecenzoj, 3000 libropriskriboj kun same multe da fotoj, 5000 tekstoj el Monato ... La embrio de tiu giganta tekstaro ekestis precize antaŭ 25 jaroj, per unu malgranda komputileto. Paŭl Peeraerts, kiu dekomence sekvis la evoluon, parolos pri tiu 25-jara historio. Nepre ĉestu: multaj membroj eĉ ne konscias pri la riĉega kolekto da informoj en unu adreso.

Je la 18-a horo Yves Nevelsteen gvidos la kurson por komencantoj.

La 15-an de decembro, nia kunvenejo restos fermita. Ni kune ĉestu la belgan Zamenhof-festo en Bruselo, sabato la 16-a. La limdato por aliĝi estas la 9-a de Decembro antaŭ tagmezo. Do, ne prokrastu, aliĝu nun plenigante jenan formularon: <https://goo.gl/forms/OwerfwQYN8DDnlz22>

Informoj pri la ZAMFESTO:

Ni invitas vin sabaton la 16an de Decembro 2017 por nia Belga Zam-Festo (± 11:30-17:00) en la Salono Zabriskie Point kiu situas ĉe la etaĝo -1 (atingebla per lifto) de la KC De Pianofabriek. Je 250m de la tramstacio «Parvis de Saint-Gilles/Sint-Gillisvoorplein»: tramoj 3, 4 kaj 51. Vidu la mapon: https://www.google.com/maps/d/edit?mid=zL2Z1nndADDE.kIA_gVqxwO4E&usp=sharing De Pianofabriek, Rue du Fort 35 Fortstraat - 1060 Bruxelles-Brusel

Jam ĵaŭdon la 14an je la 19a horo okazos Zamenhoffesto en Peer en restoracio Christoffel, Peerderbaan 65, 3990 Wijchmaal-Peer. Kiu volas partopreni devas anonci sin ĝis 9-12 ĉe henri.schutters@skynet.be.

Mi menciuj ankoraŭ 2 gravajn datojn por noti en vian (novan) agendon: 25-02-2018: Semajno de Internacia Amikeco en Leŭven – www.hungaromania.eu/nl kaj 14+15+16-09-2018 Beneluksa Kongreso en Houthalen – www.esperanto.be/beneluksakongreso.

Pasintan vendredon, la salono tute pleniĝis por la prelego de Helmut Klünder (DE) pri la Orientfrisaj Insuloj kaj la influo de la tajdo. Helmut plivarmigis la etoson por la gustigado de plej diversaj alkoholaĵoj el tiuj insuloj antaŭ kaj dum la prelego. Li montriĝas surprize bone informita pri la specifaj problemoj de tiuj "moviĝantaj" insuloj kaj la specialaj vivkondiĉoj por la enloĝantoj. La granda ĉeestantaro restis atenta kaj interesita ĝis la fino de tiu ĉi informriĉa prelego.

15-12-2017: salono fermita - 16-12: nacia Zamenhoffesto en Bruselo - 22-12 - Lode Van de Velde: Japana lingvo

Venontan vendredon, la 15-an de decembro, nia kunvensalono estos fermita ĉar ni kune iru al la nacia Zamenhoffesto en Bruselo, sabaton la 16-an. Mi proponas preni trajnon je la 10h09 en la centra stacidomo en Antwerpen. Ĝi alvenos je la 11h03 en la suda stacidomo de Bruselo. De tie ni kune promenu unu kilometron ĝis CC De Pianofabriek, Fortstr 35 en Sint-Gillis. Eblas ankaŭ trami tien. La festo okazos de la 11h30 ĝis la 17h en salono Zabriskie Point kiu situas en la etaĝo -1 (atingebla per lifto).

La ĉi-jara Zamfesto temos pri Portugalio. La klubo de Bruselo bonvenigos vin per portugala aperitivo sekvata de bona portugala manĝo (supo, varmaj pladoj kaj deserto). Poste ni havos distran programon kun interalie multnombra grupo de tradiciaj dancistoj, ĥoro de portugala kantistinoj, skeĉo, prelego pri la tre sukcesa somertendumejo de la Verdaj Skoltoj, tombolo, ktp. Bonvolu prefere vesti vin en koloroj de la portugala flago (verda kaj ruĝa) aŭ per tipe portugalaĵ vestaĵoj.

La 22-an de decembro je la 20-a horo, Lode Van de Velde informos nin pri la japana lingvo. Je la 18h Yves Nevelsteen gvidos la kurson por komencantoj.

Pasintan vendredon, ni havis surprizan viziton de 4 katalunoj kaj 1 valenciano. Ili regalís nin per brando kaj keksoj.

Paŭl Peeraerts rakontis al ni la historion de la reteblecoj, kiuj surprize disvolviĝis i.a. dank'al la intensa kunlaboro kaj reciproka instigo de Torben Kehlet kaj Paŭl. Tiel FEL ekhavis pioniran rolon kaj konservas, ankaŭ dank'al la postaj kaj konstantaj kontribuoj de Bart Demeyere, pintan rolon en la Esperanto-movado. La temo estas ampleksa kaj leviĝis multaj demandoj ĉe la ĉeestantoj. Tial Paŭl eĉ ne sukcesis pritrakti la trian parton de sia prelego pri "esperanto.be". Sed li promesis reveni en la venonta jaro por kompletigi la historion kaj pludoni utilajn informojn pri la nuntempaj uzeblecoj.

22-12-2017 - Lode Van de Velde: la japana lingvo - 29-12-2017: anekdoto vespero

Venontan vendredon, la 22-an de decembro, je la 20-a horo Lode Van de Velde prezentos la japanan lingvon. Lode iam vivis dum tuta jaro en Japanio kaj povos rakonti pri la spertoj de eŭropano, kiu volas lerni kaj ekuzi tiun lingvon kaj ĝian specifan ortografion, tiel fremda kaj for por ni. Lode havas la kapablon por prezenti malfacilaĵojn en tute digestebla maniero por ĉiu nespertulo. Do certe ne maltrafu.

La 29-an multaj klubanoj estos eksterlande por silvestraj renkontiĝoj. Mi gvidos - en tiu lasta klubvespero de la jaro - anekdotan vesperon. Mi atendas ke ĉiu ĉeestanto rakontu mallongan historieton en Esperanto. Tiel – eĉ en malgranda rondo – ni kune pasigos agrablan vesperon.

Sabaton, la 16-an, 80-o da homoj partoprenis la nacian Zamenhofan vesperon en Bruselo. La temo estis Portugalio pro la venontjara Universala Kongreso en Lisbono. La klubanoj prizorgis varman akcepton kaj bongustan manĝon. Ni ĝuis prezentadon de portugala grupo, kiu prezentis folklorajn dancojn kaj muzikon. Valère Dumont rakontis pri sukcesintaj renkontiĝoj de la Verda Skoltoj. Gerd Jacques prizorgis ampleksan libroservon. Ĉiu, kiu aĉetis tombololotojn gajnis ion, sed diversaj personoj foriris hejmen kun sako, plena de premioj. Bruselanoj ege penadis por tiu sukcesinta evento, sed esencaj allogoj de tia renkontiĝo ankaŭ estas la revido de amikoj el aliaj kluboj kiujn oni malofte renkontas, kaj la konatiĝo de novaj.